# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 2 Februaro, 2018


*Karaj Legantoj,*

*Feliĉan Tagon de la Gepatra Lingvo! Tiu ĉi Tago estas vera festo por nia E-societo, kiu kunligas gesamideanojn kun pli ol dek gepatraj lingvoj. Kvankam ruinigo de la Babela turo naskis multajn lingvojn, ofte tute malsamaj aŭ similaj, sed malamikaj kiel araba kaj hebrea, ukraina kaj rusa, sed Esperanto montras al ni vojon al la paca kunekzisto de la riĉa multlingveco.*

*Hodiaŭ, kiam kelkaj niaj gesamideanoj partoprenas TAKE-on sur la "Insulo de libero", en nia bulteno vi trovos multajn interesaĵojn, ne ĉiuj, bedaŭrinde estas ĝojplenajn. Juĝu mem.*

–Viktoro-Redaktoro




## Universitata seminario *de L. Kordylewski*



La 18an de Januaro okazis lingva seminario en Northeastern Illinois University (NEIU). La lingva seminario estis granda sukceso. Venis ĉirkaŭ 40 personoj, ĉefe la studentoj de lingvaj fakoj ĉe NEIU. Ili atente partoprenis mian anglalingvan prezentadon pri nuntempaj lingvaj baroj, Zamenhof kaj Esperanto, riĉe ilustritan per "Powerpoint slideshow". Sekvis interesaj demandoj de la publiko, kiujn vigle respondis du pluaj esperantistoj: Eric kaj la novulo-junulo Matt. Ĉio okazis en la angla lingvo. Matt venigis alian entuziasman junulon, kolegon de sia mez-lernejo. La Universitato oferis al nia seminario la Lingvan Laboratorion de Department of World Languages and Cultures, "farĉitan" per multaj modernaj instalaĵoj. Ĉefo de la Lingva Fakulktato d-ino Denys Cloonan mem ĉeestis la eventon ĝis la fino kaj starigis multajn demandojn pri Esperanto. Nia evento estis parto de la aktivado de Polish and European Academic Center for Exhange and Research ĉe NEIU, gvidata de profesorinoj Lidia Filus kaj Czeslawa Kolak. Ili ambaŭ parolis pri PEACER (Pola kaj Eŭropa Akademia Centro por Interŝanĝo kaj Esploro) kaj iliaj ligoj kun Esperanto. Evidentiĝis, ke Czeslawa estis nia longedaŭra membro de antaŭ dekoj da jaroj. Ŝi persone konis nian neforgeseblan Kent Jones.

## Kunsido januara *de L. Kordylewski*

Nia januara kunveno estis sukcesa kaj interesa. Krom 3 estraranoj aperis du novuloj, kiuj laste lernis Esperanton rete. Ili agnoskis, ke la renkontiĝo en nia grupo estis por ili la okazo realigi ilian la plej unuan buŝan E-konversacion (kiel Zamenhof kun Grabowski?)!!! Vance, la doktora studento pri neuroscienco, jam venis al ni duafoje, dum Brian, la komputilisto, aperis tute neanoncite, prezentatnte sin perfekte flua. Li trovis nin per Meetup, sed ne povis aliĝi, ĉar la nombro de la interesitoj pri nia grupo en Meetup jam atingis la limon de 50 personoj!.. Do, ni konkludis, ke indas pagi pli por la kvanto de Meetup-anoj povu kreski.

Ĉar tio estis la unua kunsido post la elektoj de la ☞

nova estraro, la nova prezidanto prezentis siajn planojn por nia estonta agado. Sekvis vigla diskuto kiu rezultis je kelkaj aldonaj proponoj:

1. Ordigi la kolekton de nia libraro kaj faciligi, ke niaj membroj povu pruntadi la librojn. Anonci la liston en nia retejo kaj organizi cirkuladon de la libroj. Kvankam la prezidanto emas prizorgi tion mem, tamen mi postulis, ke ni eble havu la bibliotekiston, kiu gardus nian kolekton. Bedaŭrinde, dum antaŭa tempo la larĝa kolekto de libroj iam ĉe Kent Jones, iel disiĝis pro manko de komuna spaco. La nuna kolekto ĉefe konsistas el nemultnobraj postrestaĵoj kun aldonoj de libroj hereditaj post d-rino Gertrude Novak, d-ro Walter Cebulski, kaj donacitaj de Bern Wheel.
2. Modernigi kaj aktualigi nian retejon. Johano F. esprimis antaŭe pretecon helpi.
3. Kompletigi la skanojn de la malnovaj "Saluton!". Eric deklaris emon fari tion.
4. Ordigi kaj pristudi la arĥivon de nia Societo por scii la historion de nia E-kolektivo. Mi proponis, ke ni kune ĝuu malfermi la "time capsule".
5. Daŭrigi uzadon de Meetup, kun plilarĝigita spaco. Mi ne plu povas prizorgi Meetup post ili ŝanĝis ĉion por la telefonoj kaj mia komputilo ne facile komprenas la ŝanĝojn. Marko bonanime pagas por ĝi, sed pro la decido plilarĝigi ni devus transpreni la koston.
6. Aperigadi informojn pri niaj kunvenoj en "Duolingo Events". Eric deklaris realigi tiun lian proponon.
7. Serĉi kontaktojn kun "izolitaj" najbaraj esperantistoj pere de "Amikumu". Mi fariĝis la plej lasta entuziasmulo kaj uzanto de Amikumu, kvankam ne tre lerta.
8. Plivigligi kontaktojn kun najbaraj grupoj en aliaj lokoj. Organizi video-konferencojn kun ili, organizi ekskursojn (ekz. Milwaukee, Madison, Champaigne).
9. Subteni, laŭ ebleco, la "Pasportan Servon".
10. Kunlabori kun "Ĝemelaj urboj" por utiligi Esperanton pere de iliaj strukturoj kaj fari kontaktojn kun E-ĝemelurbanoj. Ĉu Viktoro pretas?
11. Gardi la financojn de la Societo kaj zorgi pri ĝia leĝa stato. Ĉi kaze la prezidanto devas kunlabori kun la kasisto, kiu zorgas pagi nian registriĝon kaj raportas pri niaj financoj en la retejo.
12. Daŭrigi regulajn kunvenojn, piknikojn kaj festojn. La prezidanto gardu la kalendaron pri datoj kaj decidos pri la temo, tagordo kaj informado pri la eventoj.
13. Daŭrigi eldonadon de la monata bulteno "Saluton!". La estraro esprimis varmajn dankojn al Viktoro-redaktoro pro la farata laboro kun petoj daŭrigi. Reelekti Viktoron-redaktoron kiel membron de la estraro.
14. Fondi "Komitaton pri retaj aferoj", konsistantaj el la membroj, kapablaj efike uzi la modernajn sociajn komunikilojn. Ni proponis la junajn novulojn Brian, Vance kaj John F., ke ili helpu la estraron uzi la retumilojn.

Por la kunvena temo la prezidanto preparis dulingvan tekston pri "Demokratio", verkita de "Verda Majo", kiun ni komune legis. Refoje, la ĉeestintaj komencantoj ravigis nin per ilia perfekta legokapablo. Tio ankoraŭfoje pruvas la evidentan facilecon de Esperanto.


## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org


## Estraro:

Prezidanto – Eric Killian
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Charles Gunn
Membro – Hans Becklin

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula membro: $20
Baza membro: $10.

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website. Gifts are welcome also.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

Venonta kunsido okazos 7:00-9:00pt laŭ en la Centra Biblioteko sur la 6-a (sesa) etaĝo norda stud-ĉambro: 400 S. State St., Ŝikago.

**27-an de Febuaro** – Pri la 9-a TAKE (Randio)

**27-an de Marto** – Vintraj Olimpikaj ludoj (Puramo Ĉong)

**24-an de Aprilo** – temo estos anoncata

# Forpasis Dolores O'Riordan (1971-2018)



Neatendite, en la aĝo de 46 jaroj, lasis nian pekan teron fama irlanda kantistino de la muzikgrupo ***The Cranberries*** (La Oksikokoj). Ŝi estas mia ŝatata vokalistino de pr. 1994. Jen estas omaĝo, per Esperanta versio, de la plej konata kanto de ŝia grupo *Zombie*.

Alia korpo falas,
malaperas infanec'.
Nin perforto silentigas:
Kiu do eraras?
Sed vidu:
jen nek mi, nek mia famili'.
En via kap', via kap',
ili batalas…
per tankoj, pafiloj,
per bomboj, per bomboj...
en via kap', via kap',
ili ploradas.
En via kap'... via kap',..
zombi', zombi', zombi'!
Kio okazas... en via kap',..
zombi', zombi', zombi'?
Alia koro patrina
krevas ĝis la mort'.
Se perforto nin silentigas,
Ni do certe eraras...
Jen la sama afer'
el mil naŭcent dek ses,
en via kap', via kap',
ili batalas…
per tankoj, pafiloj,
per bomboj, per bomboj...
en via kap', via kap',
ili mortadas…
En via kap'... via kap',..
zombi', zombi', zombi'!
Kio okazas... en via kap',..
zombi', zombi', zombi'?

**Muziko:** Filip Vlček

**Tradukis:** Barjo, Alexescomu kaj Gonzalo Moreira: https://www.youtube.com/watch?v=-FYW-aRbqrk

# Poezia konkurso

La fama internacia konkurso por junuloj "Poezio tut'libera" ekzistas jam de 20 jaroj en la franca. En 2018, unuafoje, Esperanto-France sukcesis, ke oni povus ankaŭ verki poemojn Esperante. Do ni nepre devos respondi al tiu invito! Rajtas partopreni junuloj aĝaj de 15 ĝis 25 jaroj, el ĉiuj landoj. La partopreno konsistas en sendo de neeldonita poemo, versa aŭ proza, kun maksimume 30 versoj aŭ 30 linioj. La partopreno okazas nur rete ekde la 1-a de januaro ĝis la 7-a de aprilo 2018 uzante la formularon publikigitan ĉe www.poesie-en-liberte.fr. La ĵurio elektos la gajnantojn fine de majo. En novembro, tiuj estos invititaj dum 3 tagoj viziti Parizon. La poemoj estos eldonitaj en libro. Kontaktu gilles.tabard@gmail.com